



*Esperanto  
en Danio*

**19-a jarkolekto • n-ro 5 • decembro 2012**

ESPERANTO

125

1887-2012

## Esperanto en Danio

membroorgano de  
Dana Esperanto-Asocio  
ISSN 0909-6124

### Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder  
Vestavej 4, 2770 Kastrup  
☎ 32 51 31 16 [dea@esperanto.dk](mailto:dea@esperanto.dk)  
Ĝirokonto: 1551-805 7370  
UEA-kodo: deaa-t

### Kromaj estraranoj:

Arne Casper Mortensen (kasisto)  
Finn Østerbæk (vicprezidanto)  
Jens S. Larsen (sekretario)  
Bent Jensenius  
Peter Wraae

### Redakcia adreso:

Jens S. Larsen  
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77  
2770 Kastrup  
☎ 52 64 44 72 [eed@esperanto.dk](mailto:eed@esperanto.dk)

### Presado:

DDFO

### Adresŝanĝoj al:

La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

**01.02.2013**

## Enhavo

Jarfine.....	3
Forpasis Henning Olsen.....	4
Gazet-elontraĵoj.....	5
Mia Infanaĝo en Fueno.....	6
Kopenhago.....	8
Internacia Esperanto-Sumoo.....	11
UEA intervenis en Esperanto ĉe UN en Ĝenevo.....	13
5-a Afrika Kongreso de Esperanto...	14
Finna somera Esperanto-kurso.....	18
Pri la Rejkjavika UK.....	19
Librofoiro en Kopenhago.....	20
Poŝtmarko pri la Unua Libro .....	21
ILEI en Herzberg 2013.....	22

## Jarfine



Ni alproksimiĝas al la fino de tiu rimarkebla jubilea jaro kiu donis al ni kaj al la tuta movado okazon por manifesti pli ol kutime nian celon kaj atingoj. Nia lasta publika apero estis dum la Librofoiro en Bella Centro, kiu ankaŭ donis al ni apero en la dana radio DR1 kaj en la televida programo de TV2. Ni plenumis la programon de la projekto 125 kaj povas esti kontentaj de niaj atingoj.

Bedaŭrinde okazis ankaŭ malĝojigaj eventoj, unu el la lastaj estis la perdo de nia ege agema kaj sindediĉa Henning Olsen, la animo de la esperanta movado en Næstved. Estas grava perdo ne nur por Næstved, sed entute por la dana movado. Nur antaŭ kelkaj monatoj la Klubo de Næstved organizis feston de sia 35-aĝa renasko, des pli dolorige estas lia forpaso.

Tamen la vivo devigas nin ĉiam rigardi antaŭen kaj en februaro ni havos la okazon revidi nian amikon Radojica Petrovic en evento nomita “vintraj tagoj” kiam li denove instigos nin al pli bona regado de la lingvo. Tio okazos dum 3 tagoj, de la 8a ĝis la 10a de februaro, kaj mi rekomendas al vi rezervi la tagojn kaj jam nun aliĝi al la evento, sendante mesaĝon al [dea@esperanto.dk](mailto:dea@esperanto.dk).

Ni finos tiun rimarkeblan jaron festante la Zamenhofan tagon kun la deziro de pliaj fruktodonaj rezultoj por nia movado. Mi kaj la estraro de DEA deziras al vi ĉiuj Ĝojan Kristnaskon kaj Prosperan Novan Jaron!

*Ileana Schrøder*

## Forpasis Henning Olsen



Subite kaj trankvile forpasis Henning Olsen la 27-an de Oktobro 2012. Nia multjara kaj kara membro Henning Olsen ne plu estas. Membroj de la klubo en Naætvéd kaj en Kopenhago, samkiel fervojistoj en la tuta mondo funebras lian forpason. La 3-an de novembro reprezentantoj de KEK, DEA kaj DEFA partoprenis la funebraĵojn en Gamle Kapel, Næstved. Ni esprimas sincerajn kondolencojn al Karen Olsen kaj al iliaj gefiloj kaj genepoj.

Jen du memoraĵoj pri li.

Unue tiu de *Jytte Sunekær* kiu konis Henning dum multaj, multaj jaroj.

El DEFA en la barako en Otto Bussesvej ĉe la remizo de la trajnoj de DSB mi memoras, kiel Henning Olsen gvidis la kunvenojn. Estis granda aktiveco tie. Diversaj personoj instruis, estis interesaj prelegoj, venis ĵurnalistoj por intervjui nin. Ni festis je la sezonfino, somermezo kaj la kristnasko.

Henning regis nian lingvon. La gramatiko kaj prononcado estis en ordo, kaj ni aliaj profitis el tio.

Henning kaj Karen ankaŭ prizorgis la klubon en Næstved. Tien mi foje iris por festi, ekz kiam la landa jarkunveno okazis en la kluba loko. Ni ekskursis por kolekti fungojn por poste festi. Ni festis tie por substreki la jubileon en 1987, kiam kelkaj el ni distance marŝis unue dum la tago.

50-jara jubileo de IFEF okazis en Aalborg. Henning gvidis nin tra la programoj, kiam Hauge gardis sian Erna, kiu estis malsana.

Dum la diversaj klubejoj de la fervoj servo li prizorgis, ke la vivo povus funkcii. Dum la periodo en Vasbygade Astrid kaj Henning en la nomo de DEFA invitis KEK aliĝi ilian klubon. Tio okazis kaj ni tiel kune havis periodon de 8 jaroj. Karen kaj Henning membriĝis en KEK. Same kiel en DEFA Henning interesiĝis pri la bonfarto kaj justeco en la klubo kaj

kontribuis diversmaniere.

Mi konis Henning mallonge,

Iam februare 2005 post kelksemajna retstudado de Esperanto mi decidis viziti la klubon en Vasbygade, por ke mi ekzercu la lingvon. Do iun malvarman vesperon post longa serĉado mi trovis la pordon de la klubo, kaj mi premis la sonorilon, kaj feliĉe Henning rapide venis kaj tre afable bonvenigis min.

Post kiam mi spertis ne nur lian ĉiaman afablecon kaj ĝentilecon, sed ankaŭ lian lingvan ĝisfundemecon. Antaŭ la pasintjara Universala Kongreso en Kopenhago, KEK-anoj esperantigis mallongan historion de Kopenhago. Henning akceptis la tiklan defion redakti niajn kontribuajojn stile malsamaj. La rezulto estas legebla ĉi tie:

<http://kopenhago.blogspot.dk/2012/10/mallonga-historio-de-kopenhago.html>

*Betty Chatterjee*

## **Gazet-eltondaĵoj**

Jen la magra rezulto ĝis hodiaŭ:

N-ro 15 Illustreret Videnskab: Esperanto er ikke dødt.

N-ro 6 Jernbanefritid: Aktive jernbanefolk ude og hjemme

31.10 Sjællandske: Memorvortoj pri E. Henning Olsen

06.11 Ugebladet Næstved: Asocia registro

Sendu eltondaĵojn pri Esperanto en la gazetaro al: Grete Nielsen,  
Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved.

## Mia Infanaĝo en Fueno.



*Carl Nielsen*

Antaŭ kelkaj semajnoj Jytte Sunekær donis al mi Esperantigitan manuskripton de la membiografio de la komponisto Carl Nielsen, kiu estas eldonita en 1927. Ties dana titolo estas “Min fynske barndom”, Esperante: Mia infanaĝo sur Fueno.

Jytte antaŭ nelonge ricevis la manuskripton de la nevino de fuena esperantisto Jørgen Brodersen.

La tradukanto Erling Windeballe, kiu forpasis antaŭ multaj jaroj, komencis traduki la libron iam en la fruaj 1990-oj. Li plenumis la tradukon, iu lingve kontrolis ĝin, sed bedaŭrinde la libron oni neniam eldonis.

Bedaŭrinde, ĉar li skribis: “La tradukon mi dediĉas al mia kara edzino Teodozja Piasecka-Windeballe, kaj ankaŭ verŝajne estas muzikamantoj en Esperantujo, kiuj volus legi ĝin.”

Jen la antaŭparolo:

Carl Nielsen la fama komponisto, naskiĝis la 9-an de junio 1865 en Nørre Lyndelse, 10 kilometrojn sude de Odense. Lia patro estis malriĉa farbisto kaj vilaĝa muzikisto, la patrino estis milda, bonkora virino. Ili havis 12 infanojn.

Pri sia infaneco Carl Nielsen vigle rakontas en sia libro “Mia infanaĝo sur Fueno”, kaj li ofte vivece priskribas etajn detalojn. Dum sia tuta vivo li sentis profundan apartenecon al sia insulo.

Frue evidentiĝis lia muzika talento. Li ricevis instruadon pri violonludado ĉe vilaĝa instruisto, kaj jam kiel knabo li ofte piediris kun sia patro kaj aliaj muzikistoj al aliaj vilaĝoj por ludi okaze de geedziĝaj kaj aliaj festoj.

Post sia konfirmacio Carl Nielsen fariĝis lernanto ĉe butikisto en Ellinge, vilaĝo situanta iom proksime al Nyborg. Sed li ne ŝatis sian

laboron tie, kaj ĉar la butikisto bankrotis, li devis foriri de Ellinge.

Kvankam Carl Nielsen havis nur 14 jarojn li sukcesis ekhavi postenon kiel trumpetisto ĉe la militista regimento en Odense, kaj tie li restis ĝis li havis 18 jarojn. Tiam li iris al Kopenhago, kie oni akceptis lin kiel lernanton en la Reĝa Dana Konservatorio.

Finstudinte ĉe la konservatorio, Carl Nielsen fariĝis violonisto ĉe la Reĝa Kapelo, kaj poste li fariĝis direktanto de tiu fama orkestro.

Carl Nielsen estas rigardata kiel la plej elstara dana komponisto de la 20-a jarcento. Kiam siatempe li turnis sin kontraŭ la romantikismo en la muziko, multaj trovis liajn komponaĵojn malbelsonaj kaj eĉ oreĵŝiraj. Sed nun liaj verkoj estas ludataj kaj ŝatataj en la tuta mondo.

La komponaĵoj de Carl Nielsen estas tre diversaj kaj ampleksas simplajn melodiojn kaj malfacile ludeblajn orkestraĵojn. Infanoj en la danaj lernejoj kantas jam de la komenco kantetojn kun melodioj de Carl Nielsen, kaj al multaj danaj kantoj li faris facile kanteblajn, sed altkvalitajn melodiojn. Sian amon al Fueno li montras en la “lirika humoresko” “Fuena printempo”, ĉarma miksaĵo de kantoj kaj muzikaĵoj.

Carl Nielsen edziĝis al la skulptistino Anne-Marie Brodersen (Anne-Marie Carl-Nielsen), kaj ili loĝis de 1915 ĝis la morto de Carl Nielsen en la domo Frederiksholms Kanal 28 en Kopenhago.

Do, ekzistas nun du Carl Nielsen-muzeoj – unu en lia infanhejmo ĉe la vojo inter Odense kaj Fåborg, kaj la dua en la koncerta domo en Odense.’’

P.S.: Mi nun enkomputiligas la manuskripton, kaj mi esperas, ke ni iel povos eldoni ĝin. Ŝajnas, ke iu iam angligis la libron, sed ne ekzistas tradukoj en aliajn lingvojn, krom kompreneble Esperanto.

*Betty Chatterjee*

## Kopenhago

### *Printempa programo:*

14.01.2013 Feliĉan novjaron. La temo de la vespero: 'Novjaraj Promesoj'.

Jen ekzemplo: "Ĉi-jare mi lernos la hispanan. Nun mi estas sub A1 laŭ KER (mirinde, ĉu ne?) pri la hispana, sed mi atingu B1 aŭ B2 antaŭ la fino de la 31 a de decembro."

<http://snaildom.blogspot.dk/2012/01/la-hispana-kiel-malfrua-novjara.htm>

Ĉu vi faras tiajn novjarajn promesojn? Se jes, ĉu vi sukcesas plenumi ilin aŭ ne? Venu anekdoti!

21.01.2013. Studgrupa vespero. Ni legos novelon de Marvirinstrato.

28.01.2013. Ana Ĉumberlic Røssum rakontos kaj kvizos pri Bornholmo.

04.02.2013. Prelego. Informoj sekvos.

11.02.2013 Hieraŭ estis la fastfina festivalo. En Brazilo oni nomas ĝin karnavalo. Ni spektu la brazilan filmon 'Karnavala festo en Esperanto'.

<http://www.youtube.com/watch?v=ffIsx8SBBkI&feature=related>

18.02.2013 Studvespero. Sur la spuroj de Julio Baghy.

<http://vimeo.com/25273503>. Ni legu kelkajn el liaj poemoj.

25.02.2013 Ni celebru la semajnon de amikeco.

<http://uea.org/informado/sia.html>

04.03.2013 Prelegeta vespero. Venu prelegeti pri ia ajn dum ne plu ol 5 minutoj!

11.03.2013 H.C.Andersen estas mondfama dana verkisto. Ni spektu la prelegon pri li de Ole Therkelsen okazinte dum la UK-o en Kopenhago.

[http://www.youtube.com/watch?feature=player\\_embedded&v=KXnnon22tVU](http://www.youtube.com/watch?feature=player_embedded&v=KXnnon22tVU)



18.03.2013 Jarkunveno de KEK. La jarraporton de la prezidanto kaj la tagordon ni sendos al la membraro meze de februaro. Bonvolu atenti la sekvantajn statutojn:

"Voĉdonrajton en la Ĝenerala Kunveno havas ĉiu membro, kiu pagis kotizon minimume 1 monaton antaŭe." (3.4)

"Proponoj al la Ĝenerala Kunveno devas esti skribe prezentitaj al la estraro minimume 14 tagojn antaŭ la Ĝenerala Kunveno." (6.2).

Programŝanĝoj povos okazi! Se vi volus pli da informoj pri programeroj, bonvolukontakti la prezidanton de KEK, Betty Chatterjee,

rete: [bettychatterjee68@gmail.com](mailto:bettychatterjee68@gmail.com)

telefone: +45 48 42 03 86.

KEK-aj kunvenoj komenciĝos je la 19-a kaj finiĝos je la 21-a.

La adreso estas:

Tomgardsvej 35, 2400 Kobenhavn NV.

Cetere la kluba programo legeblas ĉe:

<https://www.facebook.com/group.php?gid=282186616591>

kaj en nia retpaĝo

<http://esperanto.dk/kalendaro.html>.

## Librofoiro en Kopenhago

Dana Esperanto-Asocio partoprenis en la Librofoiro de Kopenhago de la 9a ĝis la 11a de novembro. La Librofoiro estas grava ĉiujara kultura evento kun preskaŭ 30.000 vizitantoj. Ĉi-jare oni translokis la Librofoiron al Bella Centro, konata al la partoprenantoj de la lastjara UK en Kopenhago.



Ni substrekis la jubilean jaron pere de la 125-ajara jubileo simbolo kiun la partoprenantoj povis vidi ne nur en nia budo sed ankaŭ en 20 grandaj ekranoj 20 fojoj hore, entute 5400 fojojn! Sabate ni invitis niajn membrojn al renkontiĝo ĉe nia budo por festi la jubileon.

Dum la foiro nia membro Peter Wraa estis intervjuita de la kultura programo P1 de la dana radio DR pri la esperanta literaturo. La programero estis dissendita la 14-an de novembro. Krome estis mencio en “Natholdet” en TV2 la 12-an de novembro.



*Jen sekcio de la jubilea kunveneto.*



*Deŝoras Bent, Ileana kaj Arne Casper, kiu parolas kun intereso*

## Internacia Esperanto-Sumoo

Sumoo estas japana tradicia lukto. Ĉiun jaron okazas 6 konkursoj. Unu konkurso daŭras 15 tagojn. Paralele kun la veraj sumoo-konkursoj, ni jam organizis 19 Internaciajn Esperanto-Sumoo-konkursojn.

En tiu konkurso partoprenantoj decidas, kiun libron kaj kiom da paĝoj ili legu por unu tago. Kiam ili legis tiun kvanton en tiu tago, ili ricevos unu venkon. Tiamaniere ili legadas dum 15 tagoj.

La celo de tiu Esperanto-sumoo estas altigi kapablon de esperantistoj per kutimiĝo al libro-legado, kaj tiamaniere ĝi kontribuas ankaŭ al libro-eldonado, kaj Esperanto-kulturo. Dum la luktado partoprenantoj havas solidaran senton kun aliaj partoprenantoj, do tiu konkurso estas tre grava kaj utila por nia movado.

Detalojn vi vidu en nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html>

### Resumo de la 19a Internacia Esperanto-Sumoo

La 19a Internacia Esperanto-Sumoo okazis ekde la 11a ĝis la 25a de novembro 2012.

#### 1. Laŭrangaj nombroj de partoprenintoj

A *Jokozuna* (plej alta rango): 69 (perfektaj venkintoj 60 kun 15 venkoj)

B *Oozeki* (la dua): 3 (perfektaj venkintoj 2 kun 15 venkoj)

C *Sekiŭake* (la tria): 4 (perfektaj venkintoj 3 kun 15 venkoj)

Ĉ *Komuzubi* (la kvara): 0

D *Maegaŝira* (la kvina): 25 (perfektaj venkintoj 6 kun 15 venkoj)

Entute: 101 (perfektaj venkintoj 71)

Partoprenantoj, kiuj akiris 15 venkojn en la antaŭa sumoo, apartenas al A-rango (Jokozuna). Partoprenantoj, kiuj akiris 14 venkojn, 13 venkojn, 12 venkojn kaj malpli da venkoj en la antaŭa sumoo, respektive apartenas al B, C, Ĉ, kaj D.

## **2. Laŭlandaj partoprenintoj**

Japanio : 34

Francio : 16

Pollando : 10

Koreio : 6

Finnlando, Danio, Vjetnamio : 4

Brazilo, Usono, Italio: 3

Ĉinio, Germanio, Svedio: 2

Tajvano, Serbio, Barato, Kanado, Argentino, Ĉeĥio, Estonio, Mongolio: 1

## **3. Kiom da paĝoj ni legis?**

Pli ol 8436 paĝoj.

- S-ro Monsano en Japanio organizis sian sumoon samtempe kaj partoprenis en ĝi 15 japanoj, kiuj legis entute 500 paĝojn. Mi esperas, ke same kiel Monsano oni organizu sian sumoon en diversaj lokoj en la mondo.

• *[per Tara Gregers]*

## **5-a Afrika Kongreso de Esperanto**

La 11an de novembro 2012 okaze de ekzamensesio de ILEI/ UEA kunvenis en Kotonuo, Benino, Adjé Adjévi el Lomé, Togolando, kunordiganto de Afrika Komisiono (AK) de UEA, Privas Tcikpe el Kotonuo, prezidanto de Scio Sen Bariloj (SSB) kaj Mirejo Grosjean, membro de SSB. Plie partoprenis Latifou Gbadamassi el Lokossa, Benino, prezidanto de Asocio de Beninaj Esperantistoj (ABeE).

### **Faktoj:**

Okazadas Tutamerika Kongreso de Esperanto.

Okazadas Azia Kongreso de KAEM.

### **Demando:**

Kial ne okazigi tutafrican kongreson?

Tia evento endas, nepras, eblas.

**SSB pretas organizi tian kongreson en kunlaboro kun Afrika Komisiono (AK) de UEA kaj Asocio de Beninaj Esperantistoj (ABeE).**

**Datoj: de la 29a de decembro 2013 ĝis la 4a de januaro 2014**

**Loko : Kotonuo, Benino**

### **Celoj :**

Ebligi kunvenon de minimume po unu persono el ĉiuj 17 afrikaj landaj asocioj (LA) de UEA.

Ebligi kunvenon (fizikan) de Afrika Komisiono.

Ebligi kunvenon de esperantistoj el la tuta mondo kun afrikanoj.

Ebligi al la beninaj komencantoj rilati kun eksterlandanoj, nutri ilian motivigon en la lernado de Eo.



Ebligi al ne beninanoj viziti Beninon kaj konatiĝi kun ĝia riĉaspekta kulturo (Porto Novo, Abomey, Ouidah, Ganvié).

## **Partnerado**

Pro la fakto, ke malmulte da afrikanoj povos mem pagi flugon aŭ busveturadon al Kotonuo, SSB lanĉas jenan strategion:

Unu LA el la “nordo” (inkluzive Aŭstralio kaj Novzelando) subtenas finance la vojaĝon kaj restadon de unu aŭ pluraj membroj de unu LA en Afriko. Se eblas, tiu norda LA sendas minimume unu membron por ebligi konatiĝon. Ne nur la LA povas anonci sin por partneriĝi kun afrika LA, sed ankaŭ lokaj kluboj aŭ federacioj kiel la rodan-alpa federacio en Francio. Kompreneble jam ekzistantaj kontaktoj inter la nordo kaj la sudo povus enkadriĝi en tiu strategio.

## **LKK konsistas el**

Prezidanto : Privas Tĉikpe

Membroj : Adjé Adjévi, Mirejo Grosjean, Latifou Gbadamassi

Aliaj membroj ne decidpovaj aldoniĝos.

Pri Scio Sen Bariloj vidu en Vikipedio:

[http://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Scio\\_Sen\\_Bariloj&stable=0](http://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Scio_Sen_Bariloj&stable=0)

Kotonuo, la 12an de novembro 2012

Privas Tĉikpe, Adjé Adjévi, Mirejo Grosjean



Jen foto de tiu memorinda tago en kulturcentro JoCa en Kotonuo. Maldekstre: Adjé Adjévi, dekstre: Mirejo, Latifou Gbadamassi kaj Privas Tcikpe.

---

Nun ni petas vin pripensi pri aliĝo al tiu plano.

Nur per via kontribuo tiu arde dezirata renkontiĝo povos okazi.

Via Landa Asocio (LA), via loka klubo aŭ regiona grupo eble povas rilati kun unu afrika LA, partneriĝi por ebligi al unu persono veturi aŭ flugi al Kotonuo por ĉeesti tiun kongreson.

Se ne, via Landa Asocio aŭ loka klubo eble povas subteni la kongreson per donaco al la UEA konto de la organizanto: Scio Sen Bariloj (SSB). konto assb-k

La partneradon mi ricevos kaj informos la LKK-n. Jam mi antaŭĝojas legi pri via preteco kunlabori.



Pliaj numeroj de la KOTONA GAZETO informos vin tra la tuta jaro 2013.

Mia blogo enhavas plurajn ĉapitrojn pri Kotonuo, pri la Esperanto-domo en tiu urbo, pri la kulturcentro JoCa. Baldaŭ aperos sur mia blogo la kongresejo Paĉaveno kaj la plia dormejo Odjola.

Kompreneble la LKK estas je via dispono por klarigi pli pri tiu ambicia plano.

Bv uzi la okazontaĵon de la zamenhofa festo por prezenti tiun planon al viaj membroj kaj diskuti kun ili pri ebla kunlaboro.

Elkore salutas Mirejo – ĵus reveninta el Benino

---

## Poŝtmarko pri la Unua Libro

Por omaĝi la 125-an datrevenon de la lingvo Esperanto, UEA jam duan fojon mendis ĉe la nederlanda kompanio PostNL porokazan poŝtmarkon.

En aprilo aperis poŝtmarko kun la simbolo de la jubilea jaro. La nova poŝtmarko montras la kovrilon de la Unua Libro, kun la nederlandlingva teksto *Eerste leerboek Esperanto 1887-2012* (t.e. unua lernolibro de Esperanto 1887-2012). Ĝi validas por afranki normalan unuaklasan enlandan leteron en Nederlando. La poŝtmarko estas vendata en blokoj de 10 markoj. Unu bloko kostas € 6,00 (plus afranko; kvanta rabato ne estas aplikebla). Oni povas mendi ĝin ĉe la Libroservo de UEA kaj ĝi estos kompreneble vendata ankaŭ dum la Malferma Tago de la Centra Oficejo, sabaton, la 24-an de novembro.



La poŝtmarko pri la Unua Libro estas jam la sesa laŭ mendo de UEA. La antaŭaj markoj ricevis multe da publikeco en nederlandaj filatelaj revuoj, kaj la nova marko sendube spertos la samon. La temoj de la unuaj du markoj, aperintaj en 2008, estis la 93-a UK en Roterdamo kaj la 100-a datreveno de la fondo de UEA. Ili ambaŭ estas jam elĉerpitaj, sed plu haveblas la poŝtmarkoj pri la 150-a datreveno de L.L. Zamenhof kaj la 100-a datreveno de Ivo Lapenna, eldonitaj en 2009. Ankaŭ ili estas vendataj en blokoj de 10 markoj (€ 5,50 por bloko), same kiel la supre menciita poŝtmarko kun la jubilea simbolo (€ 6,00 por bloko).

## **Pri la Rejkjavika UK**

“Insuloj sen izoliĝo: por justa komunikado inter lingvokomunumoj” estos la temo de la 98-a Universala Kongreso de Esperanto en Rejkjaviko (20-27 julio 2013) laŭ la decido de la Estraro de UEA. La Estraro ankoraŭ elektos reĝisoron de la temo por plani kaj gvidi ĝian traktadon.

Laŭ la estrarano pri kongresoj Claude Nourmont, la elekto ne estis tute facila. “Farante la decidon, la Estraro eliris el du premisoj. Unue, oni kutime celas rilatigi la temon al la speciala jara temo de UN kaj Unesko, se ĝi tuŝas la agadkampon de UEA. Por 2013 taŭga jara temo mankas, sed plu daŭras la Dua Internacia Jardeko pri la Indiĝenaj Popoloj (2005-2015).”

"Alia premiso estis la speciala lingva kaj kultura situacio de Islando", daŭrigas Nourmont kaj memorigas, ke la malmultnombra islanda popolo sukcesis tra jarcentoj konservi siajn lingvon kaj kulturon. "La insuleco de Islando ne klarigas ĉion; Islando ja sendependiĝis relative malfrue." Laŭ Nourmont insuloj ne estas tiel izolitaj, kiel oni supozus. "Ili vivas per komunikado kaj per interŝanĝoj, ekonomie kaj kulture. Ŝipoj ekzistas de praa epoko, ne nur por vikinge konkeri, sed ankaŭ por liveri kaj interŝanĝi varojn, materiajn kaj nemateriajn."

# 98<sup>a</sup> UNIVERSALA KONGRESO de **ESPERANTO**



REJKJAVIKO

20-27 JULIO 2013



Por la traktado de la temo Clăude Nourmont sugestas, ke "insulo" estu komprenita ankaŭ metafore: "Ĉu ni, esperantistoj, estas insuleto de strebado al justa komunikado meze de la oceano de maljusta komunikado?"

La komunikadon oni konceptu vaste, kun precipa atento al Interreto, pri kiu Nourmont demandas: "Ĉu ĝi ebligas pli justan komunikadon inter lingvokomunumoj? Ĉu ekzemple la fakto, ke Google aldonis Esperanton inter siaj traduklingvoj progresigas justan komunikadon?" Dum la estrara diskuto pri la elekto de la temo, la estrarano pri scienca kaj faka agado Amri Wandel emfazis, ke por esperantistoj tiu ĉi aspekto estas aparte aktuala pro la atingo ĉe Google. Laŭ Wandel, la signifo de tiu atingo estas komparebla nur kun la Montevidea rezolucio de Unesko.

*[Gaz. Kom. UEA 482]*

## **ILEI en Herzberg 2013**

Se Islando estas tro longe for, eble indas iri al Germanio venontjare...

### ***Informoj kaj invito al la 46-a Konferenco de ILEI en 2013***

Temo: Dumviva lernado: Instruado de Esperanto al ĉiuj generacioj

Datoj: 12-18 julio 2013, semajnon antaŭ UK kun posta vetureblo al Rejkjaviko, Islando.

Konferencurbo: Meze de Germanio, Esperanto-urbo Herzberg am Harz, urboparto Sieber. Tiu alloga urboparto de Herzberg am Harz (ekde 2006 oficiale: la Esperanto-urbo) kuŝas en idilie bela valo de la Harz-montaro.

Loĝado kaj manĝoj: En 3-stela Esperanto-hotelo kaj restoracio Zum Pass, Haus Iris kaj en feriodomoj.

Konferencejo: Komunuma centro de la vilaĝo, kapabla akcepti 150 personojn, kun podio kaj bufedo. Krome uzeblas lernejoj klasĉambroj en tuja apudeco. Ĉio en Sieber estas facile atingebla piede.

Transporto: de ĉiuj grandurbaj flughavenoj (ekz. Frankfurt, Dortmund, Berlin, Hamburg, Hannover, Leipzig) per trajno ĉ. 3-4 horoj; ene de Eŭropo kaj en Germanio per oftaj rapidtrajnoj.

Konferenca temo: La loĝantaro en multaj landoj maljuniĝas. Kulturaj kaj klerigofertoj por ĉiuj generacioj aperas ekz. en la eŭropa 'Dumviva Lernado' programo, el kiu ankaŭ Esperanto-projektoj ricevadas subvenciojn. Kion ni lernu el tiuj projektoj? Kiun strategion ILEI ellaboru kaj sekvu, kiujn metodojn ni uzu por realigi Esperanto-instruadon de frua infanaĝo ĝis la t.n. tria generacio? Kiel ni kunlaboru kun neesperantistaj fakaj asocioj, institucioj, ktp.?

Kotizoj:

A: Ĉiuj landoj escepte de tiuj ĉi-sekve sub B.

B: Iamaj socialismaj landoj de orienta Eŭropo; ĉiuj landoj de Afriko, Latinameriko kaj Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj la Korea Respubliko).

Aliĝperiodo	ĝis 31.03.2013		ĝis 30.06.2013		post 30.06.2013	
	A	B	A	B	A	B
ILEI-membro	50 €	40 €	60 €	45 €	70 €	55 €
Ne ILEI- membro	30 €	25 €	35€	30 €	45 €	35 €
Junulo, handikapulo	65 €	15 €	75 €	20 €	90 €	25 €

Rabatoj: kiuj pagas ĝis 31.12.2013 pagas jene: A – 40 EUR, B – 25 EUR.

Premiaj rabatoj: 50% por la 50-a kaj 100% por la centa aliĝintoj.

Loĝado, manĝado, ekskursoj kaj aliaj servoj pagendas aparte.

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI) – la plej granda ILEI-sekcio, kaj Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo invitas vin!

Ĉu vi sciis – la lasta ILEI-konferenco en Germanio okazis en 1974. Tempo reveni!

*Kiel el Herzberg mem, multaj  
ŝildoj aperas ankaŭ en Esperanto* ⇒



## Finna somera Esperanto-kurso

Somera esperantokurso en Finnlando okazos en Orivesi-instituto 8.-12 julio 2013. La Instituto estas jam longe konata kiel kursejo kaj somere kaj vintre. La urbo Orivesi situas ĉe bonaj trafikvojoj, 45 km de Tampere kaj 109 km de Jyväskylä.

En la kurso instruos Dalia Pileckienė el Litovio kaj Sylvia Hämäläinen en du diversnivelaj grupoj, daŭriga kaj elementa. Formiĝos tria grupo, se al la tuta kurso aliĝos sufiĉa kvanto da studentoj. Krom lecionoj ni havos diversajn programerojn, dum kiuj ni konatiĝos ekz.kun la cirkaŭaĵo, kantos kaj ludos.

La KURSOKOTIZO estas 390 €, kiu inkludas instruadon, loĝadon kaj manĝojn (matemanĝo, lunĉo, kafo, verpermanĝeto). Krompago pri unupersona ĉambro estas 80 €.

ALIĜO ĝis 14.6.2013. Se vi scipovas la finnan lingvon aliĝu rekte al Oriveden Opisto. Alikaze kontaktiĝu kun Tiina Oittinen, sekretario de EAF (Esperanto-Asocio de Finnlando), ĉar la oficistoj de la instituto ne scipovas Esperanton. Aliĝante informu en kiu grupo vi intencas partopreni.

Pliajn sciojn vi trovas en [www.esperanto.fi](http://www.esperanto.fi). Kontaktiĝu kun Sylvia Hämäläinen pro iu ajn demando.

### KONTAKT-INFORMOJ:

Oriveden Opisto (rete: [www.orivedenopisto.fi](http://www.orivedenopisto.fi), [orivedenopisto@kvs.fi](mailto:orivedenopisto@kvs.fi)), Koulutie 5, 35300 Orivesi, tel. 020 7511 511.

Tiina Oittinen [eafsekretario@esperanto.fi](mailto:eafsekretario@esperanto.fi), 050 549 4709 (de eksterlando +358 2 230 5319).

Sylvia Hämäläinen [sylvia.h@kolumbus.fi](mailto:sylvia.h@kolumbus.fi), F.E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere, tel. 050 321 4313 (de eksterlando +358 50 321 4313).



## Mendo de revuoj por 2013

*Arne Casper informas:*

La jarfino alproksimiĝas kaj nun estas tempo por mendi revuojn.

Bv pagi rekte al nia konto reg 3627, konto 645 7274, indikante la kodo(j)n kaj ankaŭ memori ke la limdato por enpago estos

**la 20-a de decembro 2012**

– pli poste ne eblos al ni transigi la sumon antaŭ la 31-a de decembro.

Dankon !

Kodo	Nomo	Abonprezo DKK
OdE	Ondo de Esperanto	285.-
LE	La Espero	(*)
RE	Revuo Esperanto	285.-
NV	Naturista Vivo	120.-
LJ	La Jaro	41.-
JA	Juna Amiko	120.-
Mon	Monato	375.-
BA	Beletra Almanako	275.- (3 numeroj dum 2013)
FE	Femina	225.-
LF	Literatura Foiro	330.-

(\*) Informo ne ricevita

*Propono por pasigi la silvestron ...*

